

## Kiswahili kiel lingvo de paco en naturamika etoso

(kiswahili estas la svahila nomo de lingvo svahila) Verkita de: **Elisée Byelongo Isheloke** kaj tradukita esperanten de Raita Pyhala (Saliko)

Mi dankas la dekolonizan skipon de la Londona Universitato pro la invito paroli pri tre grava temo, kiun mi konsideras nepra por voko por paco en la mondo, inter homgrupoj kaj por la prizorgado de nia vivmedio. Bonvolu lasi min nomi tiun ĉi prelegon pri interkultura komprenemo kaj kompreniĝo *Kiswahili kiel lingvo de paco en naturamika etoso*.

Mia prelego havas tri celojn:

La unua, klarigi kial interkultura kompreniĝo pli gravas hodiaŭ ol iam antaŭe;

La dua; montri kiswahili kiel ekzemplon pri tio, kiel lingvo uzeblas por konstrui pacon inter diversaj sektoroj; kaj

La tria, esplori alternativojn kaj lingvajn eblojn solvi niajn nunajn komunikado-problemojn.

Per interkultura kompreniĝo mi volas diri, ke ni homoj devas kompreni kaj toleri unuj la aliajn por ke ni povu vivi pace kune, malgraŭ niaj kulturaj diferencoj. Multaj homoj, ankaŭ mi, opinias ke lingvo tiel povas kunigi nin. Verŝajne restas longa vojo por iri al tiu celo en realo, sed tiun celon ni certe atingos. Tio estas nia bebo, kiun ni nutru kaj prizorgu. Chinua Achebe esprimis tion en sia romano *Things Fall Apart* (aferoj disfalas) tiel ĉi: "La bebo sur la dorso de sia patrino ne scias, ke la vojo longas." Svahile: *mtoto mngongoni mwa mamaye hajuwi kama njia ni ndefu*.

Kvankam multlingvismo estas riĉaĵo kaj ni antaŭenigu ĝin en niaj landoj, mi malesperiĝas vidante ke la granda nombro de lingvoj ne helpis niajn landojn en la pasinteco. Tio veras, kvankam oni strebis por organizi niajn landojn per "duonbakitaj" lingvoplanoj. Netia la situacio devus esti. Multlingvismo ĉiam bonas en ne-unueca areo kun pluraj lingvoj en ĝi. Ekzemple en Demokrata Respubliko Kongo oni parolas ĉirkaŭ 450 lingvojn, el kiuj nur unu, la franca, oficialiĝis kaj fariĝis la ĉefa lingvo por la edukado, dum kvar aliaj lingvoj estas vaste parolataj trans la poroj limoj inter-provincaj kaj enprovincaj. Tiuj interprovincaj kaj enprovincaj lingvoj nomiĝas Kiswahili, Lingala, Tshiluba kaj Kikongo. Kiel vi povas imagi, tiuj lingvoj nature servas kiel pontoj inter la diversaj regionoj de DRK.

Kiswahili estas parolata ĉefe en la orienta parto de DRK, t.e. en la granda Kivuo, kiu inkludas sudan kaj nordan Kivuojn kaj Maniemon. Aliaj regionoj kie oni parolas svahile inkludas la Orientan Provincon (Kisangani) kaj Katangon, antaŭe nomita Shabo. Krome, kiswahili estas vaste parolata ankaŭ ekster DRK. La nombro de svahilparolantoj estas taksata ĉ. 40 milionoj da homoj en DRK kaj eĉ 150 milionoj da homoj en la mondo. Ĝi estas parolata en 11 aliaj afrikaj landoj, nome Tanzanio (inkludante Zanzibaron) Burundo, Ruando, Ugando, Kenjo, Malavio, Mozambiko, Zambio, Somalio kaj Komoroj. En kelkaj el tiuj landoj Kiswahili estas parolata en provincoj havantaj komunan limon kun Tanzanio aŭ proksimaj al ĝi. En pli oficiala kunteksto kiswahili rolas kiel unu el la laborlingvoj de la Tut-Afrika Parlamento kune kun la araba, franca, angla, portugala, kaj aliaj afrikaj lingvoj se eblas. Inter tiuj lingvoj kiswahili estas la

ununura identigata kiel relative indiĝena en Afriko. Estas nature vidi, ke la loĝantaro de tiuj ĉi orientaŝtataj landoj integriĝas, ĉar ili komunikadas en kiswahili. Ili integriĝas malgraŭ tio, ke la lingvaĵo nuance varias laŭ la loka gusto. La svahilon influas la aŭtoktonaj lingvoj, kun kiuj ĝi intermiksiĝas en la respektivaj landoj. Ĉio tio rezultas de dinamika plurjarcenta socia kaj kultura interagado en la regionoj.

La mal/similaĵoj en kiswahili aŭ svahilo estas multdimensiaj. Oni devas atenti pri la tono de la voĉo, la variado de la tonalto (piĉo), la prononcdiferencojn kaj kelkfoje la kuntekston kaj la kulturon, al kiu la lingvaĵo ligiĝas. La forto de kiswahili tamen kuŝas en la komunaj trajtoj aŭ la identeco de ĉiuj *Baswahili* (svahilparolantoj) translime en pli ol dek afrikaj landoj. La lingvo estas malferma al ĉiuj, kaj svahilparolantoj per sia lingvaĵo antaŭenigas la kulturon de *Utu (Ubuntu)*, kiu vorto povas esti loze tradukita per "humanismo". Ĝi signifas tutinkluzivan fratecan kaj fratinecan vivkoncepton.

Kiswahili estas lingvo, kiu apartenas al neniu unuopa afrika lando. Ĝi apartenas al ĉiuj. Kiam kiswahili penetris diversloke, ĝi pruntis vortojn de aliaj lingvoj por helpi al interkultura komuneco, kio fariĝis gravega ero de la svahila-DNA. Tio ĉi fenomeno estas nomata translingviĝo (translanguaging) laŭ Adenkule, Rapeane-Mathonsi kaj Mehta (2019) ii.

**Tabelo 1: Mal/similaj vortoj en versioj de la Svahila el la centraj kaj orientaj afrikaj landoj**

Svahilaj vortoj kiel uzataj en la DR Kongo (Nord-Kivu, Sud-Kivu, Kisangani provincoj)	Svahilaj vortoj kiel uzataj en Bujumbura, Burundio, Kigoma-Tanzanio	Svahilaj vortoj kiel uzataj en Tanzanio, Kenjo	Angllingve	Esperante
<i>Kuuza</i>	<i>Kununuwa</i>	<i>Kununuwa</i>	<i>To buy</i>	Aĉeti
<i>Kuuzisha</i>	<i>Kuuzisa</i>	<i>Kuuzisa</i>	<i>To sell</i>	Vendi
<i>Kuja/Kuya</i>	<i>Njoo</i>	<i>Njoo</i>	<i>Come</i>	Venu
<i>Kulomba/Kuomba</i>	<i>Kuomba</i>	<i>Kuomba</i>	<i>To ask or to pray</i>	Preĝi
<i>Moya/Moja</i>	<i>Moja</i>	<i>Moja</i>	<i>One</i>	Unu
<i>Makumi mbili</i>	<i>Makumi mbili/Ishirini</i>	<i>Ishirini</i>	<i>Twenty</i>	Dudek
<i>Habari ya asubuhi</i>	<i>Za asubuhi</i>	<i>Za asubuhi</i>	<i>Good morning</i>	Bonan matenon
<i>Yambo yenu/Jambo</i>	<i>Jambo</i>	<i>Jambo</i>	<i>Hello/Hi</i>	Saluton
<i>Masomo</i>	<i>Shule/Masomo</i>	<i>Shule/Masomo</i>	<i>School</i>	Lernejo
<i>Aksanti/Asante</i>	<i>Asante/Shukrani</i>	<i>Shukran/Ahsante</i>	<i>Thank you</i>	Dankon

Fonto: kompilita de la verkanto

*Kiswahili bora* (bona svahilo) kutime estas pritaksita kiel tiu de Tanzanio aŭ Mombaso en Kenjo. Tio ne estas ĝusta, ĉar ne estu konsiderataj malpli bonaj la lingvaĵoj de aliaj svahilaparolantaj grupoj kun siaj variaĵoj ekzemple en Kongo, Burundo, Ruando, Ugando, Kenjo, Mozambiko, Zambio. La lingvo inter ĉiuj ili restas la sama malgraŭ diferencoj en prononcado kaj signifoj de vortoj. Fakte la svahilo naskiĝis kiel kreolo (miksaĵo) de arabaj kaj afrikaj lingvoj en Zanzibaro kaj Tanganjiko (teritorioj el kiuj konsistas la

nuna Unuiĝinta Respubliko de Tanzanio). La sklavkomercado venigis arabajn komercistojn al Afriko jam en la unua jarcento AD kaj enpenetris Kongon en 1884 - 1887. Kongo nomiĝis *Congo Free State* (libera ŝtato Kongo) antaŭ ol fariĝi Belga Kongo. Poste multaj orientafrیکaj landoj akceptis svahilon kiel sian propran afrikan lingvon. Tial la variantoj de svahilo igas nin aprezi la belecon kaj forton de la lingvo, kiu kunigas homojn.

La Afrika Unio adoptis la svahilan lingvon kiel unu el la tutafrیکaj diplomataj laborlingvoj por la kontinento en la sesa de julio 2004. La kontinento atendas la efektiviĝon de la decido instrui la svahilan ĉie en Afriko. Mia opinio oni devus fari fondaĵon por subteni ĉi tiun iniciaton. La fondaĵon uzu landoj, kiuj deziras unuecigi la svahilan kaj ekuzi sinonimojn al ĉiuj akcepteblajn. Tio evitigos al ni la mortigadon de svahilaj vortoj kaj ebligi al ni daŭre profiti de nia kultura heredaĵo kaj abunda lingvaro. Mi opinias, ke stoki scion en proverboj kaj rakontoj estas ne disigebla parto de la riĉaĵoj de la homaro.

Afrikanoj, kiuj deziras uzi la svahilan kiel sian duan lingvon por komunikado devus fari tion demokrate kaj libervole. Tio samtempe helpu al pacema kunvivado inter aliaj lingvoj uzataj en Afriko. Aldone, tio plifortigu interkulturan komprenemon en la kontinento kaj transe. Mi kredas, ke aliaj kontinentoj devus adopti similajn aranĝojn por ke paco eblu kaj regu.

Dum jarcentoj oni provis venki la mankon de komuna lingvo, kelkfoje en maldemokrata maniero, kiam fortegaj nacioj devigis aliajn popolojn adopti iliajn lingvojn. Ekzemple franca lingvo estis altrudata al francaj kolonioj, la angla al Brita Konfederacio (*Commonwealth*). Esploroj pravas, ke tia hegemonia maniero en la lingvouzado ne estas daŭrigebla. Greka, franca kaj aliaj regantaj lingvoj havis sian eraon. Mi ne dubas, ke la angla kiel *lingua franca* aŭ la lingvo de internacia komerco kaj diplomatio estos defiata. Samtempe oni aplaudas provojn proponi Esperanton kiel pli demokratian alternativon en la lingva dilemo. Esperanto plej favore restas idealo, kiu bezonas pli da subtenado por ke ĝi venku en la lingva kampo. Plia internacia agado pruvos, ke lingvoj povas evolui, kiam homoj intermiksiĝas kiel *kiswahili*. Mi certas, ke pluraj kreolaj lingvoj tra la kontinentoj same evoluis.

Lasu homojn decidi, kio funkcias kaj konvenas al ili, kaj certigu la lingvaj rajtojn same kiel la aliaj homaj rajtoj estas apogataj kaj defendataj.

Mia unua poemo, kiu estis origine verkita kaj komponita en kiswahili, kiam mi estis juna kaj sendependa "oratoro", kaj kiun mi kantis en Tanzania konkurso, nomiĝis *Mazingira ni Maisha*. La poemo estis kantita por laŭdi la komunumon de rifuĝintoj, kiuj plantis arbojn kaj faris verdajn iniciatojn en la lando, kien ili rifuĝis. La premiita poemo, kiu perdis plurajn strofojn dum du jardekoj de translokiĝado de Tanzanio, elokvente vokas al protektado de nia vivmedio. Bonŝance mi ankoraŭ memoras ĝian unuan strofon. Jen ĝi:

*Nia vivo dependas de tio kiel ni zorgas pri Patrino Naturo.*

*Tio ĉi ĉiam veros sur la planedo Tero.*

*Sciu ke nia vivo dependas de tio kiel ni prizorgas Patrino Tero.*

*Tio estas la nuda vero kaj celo de niaj devontigoj.*

*Sciu ke nia vivo dependas de tio kiel ni prizorgas Patrino Tero.*

(Svahile: *Mazingira ni maisha! / siku zote hapa duniani / tujuwe mazingira ni maisha Ni jambo la kweli na samani / Kujuwa mazingira ni maisha*) iii

En Nyarugusu grupoj de rifuĝintoj el Kongo, Burundo, kaj kelkaj el Ruando, loĝis en la tendaro pace kun la tanganjikaj oficialuloj el *Bahaa* komunumo, kiuj venis labori aŭ komercadi kun la rifuĝintoj.

Ho, kiom mi esperas, ke la mondo lernos protekti Patrino Naturo zorgante pri nia vivmedio laŭ la spirito de la supra poemo.

Mi ege esperas, ke ni komprenos - kiel la rifuĝintoj - ke *Mazingira ni maisha*, kaj tiel farante ni helpas al homoj trafataj de naturkatastrofoj kiel tiu en *Kawasaki*, Japanio. Tie inundoj kaj uragano detruis la infrastrukturon kaj rabis al homaro multajn karajn vivojn. Kiam ni industriigas niajn landojn aŭ kiam ni evoluigas niajn landojn, provante aŭdigi niajn voĉojn por aŭ kontraŭ tio, kio nun okazas en la Ukraina-Siria milito, ni memoru *Mazingira ni maisha*. Ni uzu niajn lingvojn por **konstrui pontojn, ne murojn** inter komunumoj, kunlabore kun aliaj kaj ankaŭ kun Patrino Naturo

Ni voku pacon inter nin, en nin, al aliaj kaj ankaŭ al Patrino Naturo. Ni aŭdu ĉies voĉon kaj aprezu la variaĵojn de la rakontoj, kiuj helpas nin pluevoluigi interkulturan komprenemon.

Mi kredas, ke citante la vortojn de *Chimamanda Adichie* iv "Kiam ni forĵetas la unuopan rakonton, kiam ni komprenas, ke neniam troviĝas nur unusola rakonto pri iu loko, ni ekigas ian paradizon". Ni uzu niajn lingvojn por atingi tiun celon. Mi dankas vin. Asante sana!

La prelego estis prezentita de D-ro Byelongo Elisée Isheloke, lingvoinstruisto, interpretisto (C.I.T.D, *Decolonial subversion Journal*) kaj el-mineraloj-al-metaloj-esploristo (Universitato de Kaburbo) la 14an de oktobro 2019.

---

i Achebe, C. 1958. *Things fall Apart*. London: Heinemann.

ii Adenkule, T.O., Rapeane Mathonsi, M. kaj Mehta, G. 2019. Envisioning the use of translanguaging in public spaces as a resource in higher institutes of learning. *Journal for Language Teaching*, Volume 53, Number 1, pp. 11-35.2019.

iii Isheloke, B. E. 1998. *Mazingira ni Maisha*. Poemo en evento aranĝita de AEF organizajho en Nyarugusu Rifuĝintotendaro, Kigoma, Tanzanio.

iv Chimamanda Adichie. 2019. *The danger of a single story*.

Online: [https://www.ted.com/talks/chimamanda\\_adichie\\_the\\_danger\\_of\\_a\\_single\\_story?language=en](https://www.ted.com/talks/chimamanda_adichie_the_danger_of_a_single_story?language=en) (alirita 14an de oktobro 2019).